

## En Semaforo sonis Esperanto

■ Petro Chrdle

*Semafor* estas verŝajne la plej populara praga „teatro de malgrandaj formoj“, gvidata de unu el la plej popularaj ĉeĥaj artistoj Jiří Suchý. Al ĝia kerna artistaro apartenas ankaŭ la aktorino kaj kantistino Jolana Haan Smyčková, filino de Miroslav Smyčka, ĉeĥa operkantisto bone konata al esperantistoj el multaj aranĝoj, inkluzive de pluraj Universalaj Kongresoj. M. Smyčka en la jaro 2016 ankoraŭ sursceneje festis sian naŭdekjarigon (kie krom li kantis liaomaĝe la edzo de Jolana, operkantisto de la praga Nacia teatro Richard Haan, sed ni povis ĝui ankaŭ dueton en Esperanto plenumitan de Miroslav kun Jolana). Bedaŭrinde en la sekva jaro ni devis adiaŭi Miroslavon por ĉiam.

Sed ree al Semafor'. Invitite de Jolana, ni esperantistoj – amikoj de ŝia

patro – povis spekti muzik-komedion de Jiří Suchý, *Zlomené srdce lady Pamelý* (La rompita koro de damo Pamela), en kiu ŝi plenumis la ĉefan rolon. La prezentadon antaŭis komuna vizito de la tombo de M. Smyčka kaj omaĝo al li en la teatra klubo.

Sed la ĉefa okazaĵo, kiun mi volas menci, estis neatendita surprizo: Mi kun mia koramikino vizitis la Kristnaskan programon *Vánoce v Semaforu* (Kristnasko en Semafor'). Kvankam Jolana antaŭvertis min, ke mi estos surprizita, mi tute ne povis imagi, per kio.

Kaj ho! En unu parto de la programo la kantistoj prezentis diverslingvajn kristnaskajn karolojn, ĉiam tenante antaŭ si la flagon de la ŝtato, kie oni parolas la koncernan lingvon. Inter ili ankaŭ Jolana kun la flago de Germanio kantis germane la fa-



Foto: Dušan Dostál

man *Stille Nacht* (Paca nokt'). Kiel la lasta ekaperis denove Jolana kun Esperanto-flago enmane kaj demandis la „ĉefon“ Jiří Suchý, ĉu ŝi rajtas prezenti ankaŭ karolon en Esperanto. Dum ilia mallonga amuza konversacio li ne nur konsentis, sed eĉ konfesis, ke kiel junulo li ses semajnojn lernis Esperanton. Kaj do en la fama praga teatro Semafor' sonis en Esperanto forte aplaŭdota karolo „*Dormu, ho, mia prince!*“ en traduko de Jiří Kořínek plenumata de Jolana Haan Smyčková. Ĉar „Kristnasko en Semafor'“ estis prezentita naŭfoje, do naŭfoje la publiko en komplete disvendita teatro aŭdis interesan dialogon pri Esperanto kaj ĝuis Esperantan karolon. Certe tre konvena maniero kiel prezenti Esperanton. Gratulon, Jolana, kaj dankon!

## ILEI

## Esperanto-kongresoj en Madrido julio 2018

■ Radojica Petrović

La kultura heredaĵo de Esperanto estas la ĉeftemo de la 51-a Kongreso de ILEI (Madrido, 21-28 julio 2018). Ĝin inspiris la *Eŭropa jaro de kultura heredaĵo 2018* kaj la *Internacia jardeko de proksimiĝo de kulturoj, 2013-2022*, sed ĝin ĉefe motivas la bezono flegi kaj plikonigi la kulturajn valorojn kaj la kulturkreadon de Esperanto. La Iberia duoninsulo, kiu donacis multon al la monda kultura heredaĵo kaj en kiu hejmas pintaj kulturkreatoj de Esperanto, estas la ĝusta medio por trakti tian temon tra varia kaj abunda faka, kultura, kleriga kaj turisma programo.

Unu el la kolonoj de la hispanlingva kulturo estas Cervanto, kiu kun siaj literaturaj herooj – la revema Don-Kiĥoto kaj pragmata Sanĉo Panzo, la revata Dulsinea del Tobozo kaj reala Aldonza Lorenzo – monumente ornamas la belegan *Placon de Hispanio* (*Plaza de España*) de la kongresurbo kaj sugestas metaforojn pri la revoĵo

kaj realo de Esperantujo. La streboj de Don-Kiĥoto al noblaj idealoj kaj lia batalo kontraŭ ventmueliloj metaforas la strebojn de la esperantistaro al justa komunikado kaj kontraŭ la ventmueliloj de kultura hegemonio, kaj la pragmata Sanĉo Panzo metaforas la nepron, ke tiuj streboj ĉerpu la inspiron kaj energion el la realo de homara evoluo kaj homaj bezonoj. La idealismo kaj la pragmatismo, la multlingvismo kaj nur-angla tutmondismo – jen antipodoj, kiuj ne eblas unu sen la alia.

Ĉu la vivo estas nur revo kaj ŝajno, kiel sugestas Don-Kiĥoto kun Dulsinea, aŭ ĝi estas firme ligita al la materia realo, kiel respondus Sanĉo Panzo kaj Aldonza? Ĉu pli gravas la *Interna ideo* kiel neatingebla gvidstelo de la esperantistoj, aŭ la Esperanto-komunumo kiel materia kadro de praktika uzo kaj ĝuo de la Internacia lingvo de d-ro Zamenhof? Ĉu la finvenkismo aŭ la raŭmismo montras la ĝustan vojon? La kongresoj en Madrido julio 2018 ne tro zorgos pri tiuj dilemoj. Ne forgesante la idealojn de la espe-

rantismo, ili koncentros sin al la reala kultura heredaĵo de Esperanto kaj aktuala kulturkreado en Esperanto.

La ILEI-kongreso okazos samloke kaj parte koincide kun la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22 julio), en spacoj de moderne ekipitaj studenthejmoj en la universitata parto de Madrido. Iliaj programoj estos suplementaj. La tradicie riĉa kulturarta kaj turisma programo de la Hispanaj Kongresoj estos adekvata kontribuo al la ILEI-kongresa ĉeftemo. La abunda faka kaj kleriga programo (pedagogia foiro, instruista trejnado, kursoj, prelegoj, atelieroj, diskutrondoj) pliproksimigos al hispanaj esperantistoj la agadon kaj utilojn de ILEI. La komuna aliĝilo (<https://goo.gl/forms/kEhdz00WJITGx3lh1>) proponas rabatitajn kotizojn, se vi aliĝos al ambaŭ kongresoj.

